



九十九夜(つくもよ)

新作狂言

登場人物: 少将、小町

少将「是は京に隠れもない、深草少将……ではなく、朋輩(ほうばい)の藤森少将で御座る。深草少将、何を血迷われたか、今を時めき給ふ小野小町殿に懸想召され、百夜(ももよ)通ひを契(ちぎ)られて御座る。小町殿の門前まで百夜通ひとおせば、百日目に小町殿が逢ふてくださるという決めごとで御座る。とはいえ、引く手数多の深草少将、通う暇など御座らぬ。暇な私めが毎夜代役で通ひ、小野小町殿の門前へ芍薬(しゃくやく)の花を一輪づつ置いて参ります。今宵は九十九夜で御座れば私はこれでお役御免。明宵百夜(ももよ)は代役の私ではなく、深草少将ご自身が通われます。いや、雨が降って参りました*」

(雨音)

小町「是は都に比ぶるものない美人と評判の小野小町で御座る。とはいえ寄る年波は争えず『いつまでも若々しい』などと言われても齒の浮くばかり。高貴な御家柄の深草少将さまに懸想(けそう)されて御座るが、すぐにお逢いしですぐに捨てらるは世の倣ひで御座れば、百夜通へば逢ふと定めて御座る」

少将「とかう申すうちにこれござる。小野小町殿の門前へ芍薬の花を一輪置いて、私はもうかう帰りましょう。お声を聞きたいものじゃが、それはかなわぬ。いや、雨がますますひどくなりました」

小町「雨がやみませぬ。深草の少将さまは来られたかしらぬ。いや、門前にお姿が見えました」

少将「いや、傘も持たぬが、濡れて帰りましょう。明日も雨で御座れば、深草少将も濡れることで御座ろう」(笑う)

小町「はや帰られるか。濡れて御座る。明日も雨で御座ろう。気の毒で御座る。今宵は九十九夜、百夜までひと夜足りぬが、逢いましょう。もし、深草少将さま」

Naŭdeknaŭa Nokto

Noa Komedio verkita de

SIMATANI Takesi 2022

Subgeneralalo: En Kioto ĉiu scias la Subgeneralon Hukakusa. Mi estas Subgeneralalo... ne Hukakusa, sed Huĝinomori, lia amiko. Pro kaprico la Subgeneralalo Hukakusa enamiĝis al la Damo Onono Komaĉi, kiu ĝuas grandan reputacion. Ili promesis, ke Cent Noktojn li vizitos ŝian pordon kaj en la centa nokto li vidos ŝin. Mia amiko tro okupita tamen ne povas mem viziti la Damon. Tial ĉiun nokton mi vizitis ŝian pordon kaj tie metis floron de peonio. Jam estas la naŭdeknaŭa kaj la lasta nokto por mi. Morgaŭ nokte la Subgeneralalo Hukakusa mem vizitos kaj vidos la Damon Onono Komaĉi. Ho ve, jam ekpluvis.*

(sono de pluvo)

Komaĉi: Mi estas Onono Komaĉi, la plej fama kaj bela en Kioto. Tamen jam ne juna mi estas kaj agacas min la vortoj "Ĉiam pli bela estas la Damo." Al mi enamiĝis la Subgeneralalo Hukakusa el nobla familio. Ĉar facile plenumita amo ne estos longa, mi postulis de li centnoktan vizitadon.

S: Jam mi staras antaŭ la pordo de la Damo Onono Komaĉi. Ĉi tie mi metu floron de peonio kaj reiru. Almenaŭ ŝian voĉon mi volus aŭdi, sed mi ne povas... Ve, pluvas pli kaj pli forte.

K: Ankoraŭ pluvas. Ĉu jam venis la Subgeneralalo Hukakusa? Tie li staras!

S: Mi tute malseka rapidu hejmen, ĉar mi venis sen ombrelo. Ankaŭ morgaŭ pluvas kaj trempita estos la Subgeneralalo Hukakusa. (ridas)

K: Ĉu li reiros? Tute trempita! Ankaŭ morgaŭ pluvas. Mi kompatas lin. Kvankam estas la Naŭdeknaŭa kaj mankas unu al la Centa Nokto, mi

少将「あ、いや小野小町殿か」
小町「雨がひどう御座る。明宵も雨で御座ろう。百夜までひと夜足りぬが、今宵逢いましょう」

少将「いや、それはなりませぬ」
小町「なんの、ならぬことがあるうか。雨が降り頻(しき)ります。明日の宵は橋が流さるやもしれませぬ。今宵逢いましょう」

少将「是はいかな事。深草少将に知られては如何(いかが)。さりとて千載一遇という言葉も御座る」

小町「ささ、とおられよ」

少将「とおりましょう」

小町「小野小町で御座る。深草少将さま、百夜通ひ有り難うございます」

少将「……少将で御座る。ひと夜足りませぬが逢うてくださり、有り難う御座る」

小町「深草少将さまが芍薬の花に毎夜添えられた歌は見事で御座いました」

少将「(それは皆、私が深草少将のかわりに詠んだ歌で御座る。よしよし、歌の試合なら私の手柄で御座る) 斯うも御座ろうか……
暁の 嶋(しぎ)の羽(はね)がき
百羽(ももは)がき**」

小町「(さすがは深草少将で御座るが、歌では負けませぬ) 君が来(こ)ぬ夜は
我(われ)ぞ数(かず)かく」

少将「お見事で御座る。(深草少将に憎まれても構わぬ。このような才媛に逢うことは二度とあるまい)」

小町「(深草少将は高貴なれど才ありとは聞きませぬ。ひとつ試してみよう) 深草少将さまは笛の名手と伺います」

少将「(なんの、笛の名手は深草少将では御座らぬ。私で御座る) では、笛にあわせて吟じてくださりようか」

小町「畏(かしこ)まりました」
(少将の笛にあわせて小町歌う)

akceptu lin. Bonvenon, Subgeneralo Hukakusa!

S: Ha, Damo Onono Komaçi!

K: Pluvas forte kaj pluvas ankaŭ morgaŭ. Kvankam mankas unu al la Centa Nokto, ĉi-nokte vi vidu min.

S: Ne, Damo, mi ne povas vidi vin.

K: Vi ja povas! Pluvas forte. Morgaŭ diluvo povos forfluigi la ponton. En ĉi tiu nokto vi vidu min.

S: Kia surprizo! Koleros la Subgeneralo Hukakusa. Tia bonŝanco tamen neniam trafos min, eĉ se mi vivos mil jarojn.

K: Bonvolu enveni, mi petas!

S: Mi envenu.

K: Salutas Onono Komaçi. Mi dankas vin, Subgeneralo Hukakusa, pro via Centnokta vizitado.

S: Salutas Subgeneralo Huĝ... Mi dankas vian bonvenigon, kvankam mankas unu nokto.

K: Plej belaj estas la utaoj, kiujn vi ĉiunokte aldonis al la floroj de peonio.

S: (Mi Huĝinomori versis la utaojn anstataŭ Hukakusa! Bone, mi sci-povas versi bele) Nun mi provu:
Aŭrore al si kombadas skolopido centfoje plumojn**

K: (Plej bele versis la Subgeneralo Hukakusa. Mi tamen ne cedas)
Dum mi kalkulas nombron da noktoj sen vizito

S: Bele vi reversis! (Jam ne ĝenas min kolero de Hukakusa. Neniam mi retrovos tian talenton)

K: (Mi neniam aŭdis, ke la Subgeneralo Hukakusa estas talenta. Mi senmaskigu lin) Oni laŭdas vin virtuoza de fluto.

S: (Ne Hukakusa, sed mi Huĝinomori estas virtuoza!) Bone, mi ludu fluton por kanto de Damo.

K: Bone, mi kantos.

(kun fluto de S kantas K)

小町「詠まれる歌も笛も見事で御座るが……」
少将「何で御座る」
小町「御背中中の紋は深草さまの紋ではなく、藤森さまの『上り藤に一文字』」

少将「是はしたり、申しわけ御座らぬ」

小町「では九十九夜通われたは……」
少将「藤森少将で御座る。深草少将に頼まれて御座る」(逃げる)

小町「もし、藤森少将さま」

少将「何で御座る」

小町「今宵のことは口外無用で御座る。明日は百夜で御座れば、深草少将をお待ち致します」

少将「忝(かたじけ)のう御座る、ほんに忝のう御座る」(退場)

小町「明日は百夜じゃが、雨は止みますまい。それでも深草少将さまが来られれば、偕老同穴(かいろうどうけつ)の契りも難(かた)くはない。それとも大雨で渡る橋が流されるやも*……それが定めというならば、それで、よう御座る。それはそれで、また、よう御座る」(笑う)

(終)

*伝説で、深草少将は小野小町に百夜(ももよ)通いの約束をして九十九夜(つくもよ)まで通ったが、百夜目に通う途中で命を落とした。雪で凍死した、あるいは大雨で橋ごと流されたという。通った印に毎夜門前に残したのは、芍薬(しゃやく)の花とも、榎(かや)の実ともいう。

**古今和歌集・恋五・761・詠み人知らず

「暁の
鳴(しぎ)の羽根がき
百(もも)羽がき
君来ぬ夜は
我ぞ数かく」

K: Kvankam bele vi versas kaj ludas...

S: Kio ĝenas vin?

K: La marko sur via dorso estas ne de Hukakusa, sed "Unu inter Ascendaj Grapoloj de Visterio" de Huĝinomori.

S: Ve, mi estas senmaskita! Pardonu min!

K: Naŭdek naŭ noktojn vizitis min...

S: Subgeneralo Huĝinomori en komiso de la Subgeneralo Hukakusa. (for-kuronta)

K: Mi petas, Subgeneralo Huĝinomori!

S: Kion vi petas?

K: Sekretu la aferon en ĉi tiu nokto. Morgaŭ estos la Centa Nokto kaj mi atendos la Subgeneralon Hukakusa.

S: Mi dankas vin! Elkore mi dankas vin! (foriras)

K: Kvankam morgaŭ estos la Centa Nokto, pluvo ne ĉesos. Se la Subgeneralo Hukakusa venos spite la pluvegon, mi esperu pri eterna amo kun li... Aŭ nia destino forfluigos la ponton*... Ambaŭ estos bone. (ridas) (fino)

* Laŭ malnovaj rakontoj la Subgeneralo Hukakusa aranĝis Centnoktan Viziton al Onono Komaĉi kaj vizitis ŝin naŭdek naŭ noktojn. Li mortis survoje en la centa nokto. Laŭ unu rakonto pro frosto en neĝo. Laŭ alia en pluvego ponto falis kun li en riveron. Por atesti viziton ĉiunokte li metis antaŭporde aŭ peonian floron aŭ semon de torejo.

** La Kantaro Kokin, Amo 5-761, ne konata aŭtoro:

Aŭrore al si
kombadas skolopido
centfoje plumojn
Dum mi kalkulas nombron
da noktoj sen vizito

Pluvas longe (雨)



poez. KITAHARA Hakusyuu, muz. Hirota Ryuutaroo, trad. SIMATANI Takesi



1) Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
2) Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
3) Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
4) Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
5) Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.



Res - ti hej - me de - vas mi, ĉar man - kas nun omb - rel'.
Ne eks - te - re, sed mi hej - me lu - du sen omb - rel'.
Kri - as jen fa - za - no e - ta, nu - da sub ĉi - el'.
Dum mi en - dor - mi - gas pu - pon, plu - vas de l' ĉi - el'.
Plu - vas ta - ge, plu - vas nok - te. Plu - vas de l' ĉi - el'.



De san - da - lo jam ŝi - ri - ĝis ru - ĝa ri - me - net'.
Fal - du mi fi - gu - ron be - lan el ko - lor - pa - per'.
Fros - tas al fa - za - no nun mal - ga - ja la ve - ter'.
Jam for - bru - lis ĉi - u art - faj - ra - ĵo sub a - ler'.
Plu - vas ĉi - am, plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.

雨 (あめ)

北原白秋 (1885-1942) 作詞
弘田龍太郎 (1892-1952) 作曲

- 1) 雨がふります 雨がふる
遊びにゆきたし 傘はなし
紅緒(べいお)の木履(かっこ)も緒(お)が切れた
- 2) 雨がふります 雨がふる
いやでもお家で 遊びましょう
千代紙(ちよがみ) おりましょう たたみましょう
- 3) 雨がふります 雨がふる
けんけん小雉子(こきじ)が 今啼(な)いた
小雉子も寒かる 寂しかる
- 4) 雨がふります 雨がふる
お人形寝かせど まだ止まぬ
お線香花火も みな焚(た)いた
- 5) 雨がふります 雨がふる
昼もふるふる 夜もふる
雨がふります 雨がふる

Pluvas longe



poez. KITAHARA Hakusyuu, muz. HIROTA Ryuutaroo
trad. SIMATANI Takesi

- 1) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Resti hejme devas mi, ĉar mankas nun ombrel'.
De sandalo jam ŝirigis ruĝa rimenet'.
- 2) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Ne ekstere, sed mi hejme ludu sen ombrel'.
Faldu mi figuron belan el kolorpaper'.
- 3) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Krias jen fazano eta, nuda sub ĉiel'.
Frostas al fazano nun malgaja la veter'.
- 4) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Dum mi endormigas pupon, pluvas de l' ĉiel'.
Jam forbrulis ĉiu artfajraĵo sub aler'.
- 5) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Pluvas tage, pluvas nokte. Pluvas de l' ĉiel'.
Pluvas ĉiam, pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.